M 1c Paul Gottgetreu, Herrenstr. 12
2. April 1931
2289

7-a JARO, N-o 342 LEIPZIG, 23. / 4. 1931
ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

LA NACIISMO EN PALESTINO

La juda enmigrado en Palestino komenciĝis depost kelkaj kvindek jaroj antaŭ la milito per la starigo de agrikulturaj kolonioj, kun la financa helpo de la riĉegulo E. Rotŝild. La mahometanaj terposedantoj, kiuj havis sufiĉe malgrandajn profitojn el siaj bienetoj, preferis ilin vendi al la judoj. Depost la fondo de l' unua kolonio juda en 1870 transiris en la posedon de l' novaj koloniistoj iom post iom 51 600 hektaroj da grundo.

Precipe depost 1908 en tiu koloniigado distingiĝis la cionista movado kun siaj naciaj renaskiĝ-ideoj k surpremis fine la stampon karakterizan al la tuta juda agado en Palestino. La enmigrantoj estis pli k pli terkulturistoj judaj, kiuj trovis al ili rezervitajn koloni-teritoriojn k anstataŭis tie la indiĝenajn laborulojn. Tiu ŝanĝo donis okazon por la unuaj kunpuŝiĝoj inter la araba k la juda elementoj.

Anglio, pro imperiismaj motivoj, dum la milito interesiĝis speciale pri Palestino k la juda problemo. La proksimo de l' Sues-kanalo, la gravo de l' haveno de Haifa kiel ŝipar-apogpunkto, k Mosul-petrola enŝarĝejo estis la difinaj motivoj por Anglio por akiri "mandaton" super Palestino, kiun ĝi sukcesis ekhavi dank' al la tolerema sinteno de l' franca imperiismo.

Kaj la naciista movado de l' judoj, la cionismo, servis nun kiel tre utila kontraŭpezo al la depostuloj de l' araba naciismo en la manoj de l' britiaj regantoj. Post la deklaro de Belfur (Balfour) de 2. nov. 1917 efektive la cionista movado faris rapidajn progresojn. En la jaroj 1920—29, pli ol dum la tuta periodo de 1870—1914, pluraj miliardoj da kapitalo estis investataj sub diversaj formoj de ekonomia k socia aktiveco; la juda loĝantaro plialtiĝis, kompare kun 50 mil loĝantoj antaŭmilitaj, je pli ol 100 mil novaj enmigrintoj.

Ĉi tiu "invado" estigis sangajn konfliktojn, kie la religia fanatiko servis nur kiel esprimilo de profunda socia malsano. Jen la bilanco: en februaro 1920 — 9 mortigitoj k 200 vunditoj; majo 1921 — 95 mortigitoj k 259 vunditoj; aŭgusto 1929 — 299 mortigitoj k 521 vunditoj.


Unu el la novaj centroj en Palestino: Tel-Aviv.

Sed en la jaro 1929 Britio ne plu daŭrigas sian politikon de 1917, kiam ĝi ĉiuokaze utiligis la naciistan movadon judan por siaj imperiismaj celoj: nun ĝi ludas duoblan rolon, ĉar la vekiĝo de l' araba nacimovado antaŭmetas novajn problemojn al ĝi. Ne nur tie, ankaŭ en Persio, Egiptio k en Hindio la angloj devas kalkuli kun la mahometanaj elementoj (en Hindio, por kontraŭstari la hinduanan nacimovadon).

Sekve, Britio atentas nun pri la aspiroj de l' araboj krei propran ŝtaton; tio kompreneble ne plaĉas al la cionistaj ĉefoj, kiuj protestis kontraŭ la konkludoj en la "Blanka Libro", kiun publikigis en oktobro 1930 la angla registaro. Oni devas konstati, ke la gvidantoj de l' cionista movado tute ne havas klarvidon pri la imperiisma politiko de l' grandaj potencoj; ili konsideras malvastspirite la judan problemon kiel unu el la ĉefaj problemoj de l' homaro k ĝian solvon kiel taskon speciale truditan al la historio. Ekzistas, apud tiu naciista elemento, en la cionismo ankaŭ la spirito mesieca, kiu iel ligas la saviĝon de l' tuta homaro kun tiu de l' juda popolo. Sed en la kadro de l' nunepokaj konfliktoj imperiismaj k sociaj la juda problemo forviŝiĝas ne nur kiel elstaranta problemo, sed eĉ ĉesas esti sendependa historia faktoro.

La okazintaĵoj el aŭgusto 1929, kiuj formis la objekton por la raporto Simpson pri enmigrado k koloniigado k por parlamenta enketo, atentigis krude k laŭte pri la sorto de l' terkulturaj laboristoj arabaj, kiujn senlaborigis la judaj enmigrintoj. Resumon pri la nomita raporto donis la "Revuo Internacia de l' Laboro" (febr. 1931), kiu skribas interalie: "La meza nuntempa amplekso de l' arab-kamparanaj farmoj estas malsufiĉa por certigi al ili iomete decan vivnivelon . . . La araba terkulturisto hodiaŭ troviĝas en malespera situacio." Kaj ĝi konstatas, ke pro la senlaboreco de l' indiĝena proletaro la vivnivelo de l' laborula loĝantaro malaltiĝis konsiderinde. Laŭ araba ĵurnalo, kiu parolis pri vendo de infanoj je la prezo de 50 k eĉ 25 funtoj sterlingaj, la sklavkomerco en Palestino ŝajnas enkondukiĝi kiel sekvo de la kamparana mizero.

La komunistoj konkludas pri la situacio jene: "La batalo kontraŭ la cionismo fariĝas la bazo de l' agrara revolucio en Palestino". La socialistoj rekomendas la kunlaboradon inter judaj k arabaj laboristoj. Sed — la sindi-

kata federacio de l' judaj laboristoj daŭrigas en Palestino politikon klare naciisman; k tio estas riproĉita en la raporto Simpson per jenaj rimarkoj: "Se la ĝenerala Konfederacio de Laboro juda ne forlasas la politikon, kiun ĝi sekvas, malhelpante la dungon al araboj en la terkulturaj kolonioj k en la entreprenoj judaj ĉiuspecaj, nenia pliboniĝo povas esti atendata per pliampleksigo de l' juda agado."

La nacia ekskluzivismo de l' cionismo k ĝiaj unuflankaj postuloj konsistigas baron al ĉiu akceptebla solvo de l' palestina problemo. Certe, tiom longe kiom ne ekzistos sindikatoj unuecaj, en kiuj estas egalrajtaj araboj k judoj, la laboristaro en Palestino ne povas esperi pri venkaj elpaŝoj sur la vojo al socialismo.

Laŭ div. fontoj kompilita de Noa.

EL GERMANIO

"Ĉiu germano havas la rajton, libere diri sian opinion[1]"

La ekonomia atako kontraŭ la germana laboristaro sukcesis. La ekonomiaj rajtoj de l' laboristoj ekzistas nur tiom, kiom ili estas necesaj por malhelpi ribelojn aŭ revolucion. Nun la kultura atako komenciĝas.

Jam antaŭ unu jaro, la regna ministro *Severing* leĝigis la "Protekta leĝo por la respubliko". Per ties kaŭĉukaj paragrafoj la juĝistaro havas la eblon, puni ĉiun kontraŭŝtatan agadon. Laŭvorte ĝi estas direktita kontraŭ la naciistaj kontraŭuloj de l' respubliko; fakte, ĝi estis k estas uzata precipe ĉe laboristoj. Estis kondamnitaj eĉ kompostisto pro komposto de revolucia artikolo, eĉ librotenisto pro vendado de komunistaj libroj vendeblaj en ĉiu burĝa librotenejo. — Por liberpensuloj ekzistis k ekzistas la § 166, laŭ kiu estis kondamnitaj homoj pro nura gluado de liberpensulaj afiŝoj. Sed, laŭŝajne, eĉ tio ne sufiĉas.

La 5-an de marto, la posteulo de *Severing, Virt* (Wirth), donis la signon por la kultura atako per parlamenta parolado: Li plendis pro la netoleremo de l' liberpensuloj, kiuj finis siajn (nur malofte permesatajn) radio-paroladojn per la invito eksiĝi el eklezio. Tiam li atakis la komunistan gazetaron k la "sen-diajn vesperojn", la krudaĵojn ktp. Tiuj montrus, ke ne sufiĉus la estantaj leĝoj. "Ni intervenos tre energie kontraŭ tia fikulturo."

Estante nun prusa ministro, *Severing* tuj aŭdis ĉi tiun alarm-krion; la 11-an de marto li parolis pri la sama temo. Li ja konsentis al liberpensuloj la rajton je libera opini-esprimo, sed limigis ĉi tiun, ke ili ne ofendu la senton de ne-samopiniantoj. (Kiam do agado de l' liberpensuloj ne ofendas la sentojn de l' eklezianoj? Ĉi tiuj eĉ ne riskas defendi siajn instituciojn en publikaj kunvenoj, ĉar la faktoj elmontrus ilin mensogintoj). Li, *Severing,* mem laŭdire iniciatis konferencon de l' landaj ministroj por malhelpo de l' liberpensula agitado k eble por nova escepta leĝo. — Tiu kunveno okazis.

Jam la 14-an de marto la polica prezidanto de Berlino, malpermesis kulturan ekspozicion liberpensulan en Berlino. Poste la "centrejo por proletaj gramofonaj diskoj" estis traserĉata k diskoj estis konfiskataj.

La 28-an de marto, la regna prezidanto donis dekreton "Por malhelpi politikajn ekscesojn". Laŭ tiu dekreto la polico povas malpermesi ĉiun kunvenon, ĉiun manifestacion, ĉiun flugfolion, ĉiun gazeton, "se oni povas *supozi,* ke estos instigata al malobeo kontraŭ leĝoj, aŭ, ke estos ofendataj institucioj de l' ŝtato aŭ la eklezioj". Procesioj kompreneble estas permesataj, ĉar liberpensuloj ja ne havas senton, kiu estas ofendebla.

Tion klare elparolas *Span* (Spahn), montrante same la celon de l' kultura atako: Li postulas forigon de samrajteco por eklezianoj k liberpensuloj. La eblo por tio ankoraŭ ekzistas en la dekreto. Sed, ĉi tiu eblo estas nur provizora cedo al la socialdemokratoj. Nun la atako celas precipe trafi la komunistojn, utiligante la bedaŭrindan dissplitiĝon inter la liberpensuloj; poste, tiu escept-leĝo certe estos aplikata ankaŭ kontraŭ la nekomunistaj liberpensuloj.

La signifon de tiu atako trafe esprimas la "Antaŭen", la ĉefa organo de l' Socialdemokrata Partio, per karikaturo celanta la faŝistojn, kiu tamen validas por ni revoluciuloj tiom pli: Princo k faŝisto fuĝante antaŭ monstra polica bastonego kun la subskribo: "Nur tiel kelkaj homoj lernas kompreni, kio estas demokratio!" *16 900.*

[1] El la Konstitucio de la Germana Regno.

"EN LA OKCIDENTO NENIO NOVA"

Mi vidis la filmon en Venlo (Holando). Malgraŭ ke estis sep el dek vizitintoj, kiuj asertis, ke ĝi estas senvalora, mi oferis mian guldenon. Tamen mi ne intencas pritrakti ĉi tie, ĉu la filmo sukcesis aŭ ne. Mi nun deziras rakonti ion alian, ion pri . . . iu patrino, kiu sidis antaŭ mi, malgranda, delikata virino kun sulka vizaĝo k neĝblankaj haroj, germanino.

Mi ŝovis min iom pli profunde en mian apogseĝon k havis la senton, kvazaŭ mi profundiĝus en miajn pensojn, kiuj formis bildon pri tiu virineto, tiu germanino, kiu estas patrino k nun venis por vidi la filmon "En la Okcidento nenio nova".

Ŝi sidis tie tute senmove, la maljunulaj manoj sur la genuoj. Ŝi rigardis al la blanka ekrano k vidis la forirantajn junajn soldatojn. Mi pensis, ke ŝi ankaŭ havis filon, kiu kuniris, tre juna infan-viro. Ŝi ne ploris, kiam li iris, sed ŝi postrigardis lin, ĝis ŝi nenion plu vidis de li. Pli maljunan kamaradon ŝi petegis varti k gardi lin.

"Mia knabo, ĉu vi estos tre singarda?"

"Jes, panjo."

Li foriris ĝojege! kiel multaj aliaj.

Kion li travivis ĉe la fronto, ŝi ne scias, ĉar kiam li venis havante forpermeson, li ne deziris rakonti ion. "Ni fartas bone, panjo . . . Ni . . . ni havas sufiĉe da manĝaĵo k . . . ne estas tiel terure."

Ĉu ŝi kredis lin? Ne, kompreneble ne. Patrino ne tiel facile trankviliĝas.

Nun, sur la blanka tuko ŝi vidas, kion li travivis. Kuŝas stranga brilo sur ŝia sulka vizaĝo. Ŝiaj manoj moviĝas nerve. Subite ŝi kaptas time la brakon de l' knabino apud ŝi k diras: "Aĥ Got!" (Ho Dio!)

Sonas kiel ekĝemo.

La knabino, ŝia filino, kliniĝas al ŝi. Estas flustrado de vortoj en la silento de la salono. "Ne ploru, patrino!"

Tiam ŝi sidas denove neparolante k rigardas. Sed unu el siaj manoj ŝi estas metinta sur la lokon de sia koro. Stranga emocio kaptas min. Mi intencas ne plu rigardi al tiu virino, tiu patrino, kiu nun denove . . . (por la kioma fojo?) suferas dolorojn pro la sorto de sia filo, kiu jam antaŭ jaroj batalis sian batalon. Kie? Kial? . . .

Miaj pensoj pluen iras, k mi vidas okazi, ke kuglo trafas lin, rekte en la koron; aŭ —, ĉu eble estus pli terure, k ĉu li devus suferi horojn de terurega soleco, antaŭ ol la morto etendis la kompatajn manojn al li? Kiel okazis tio? . . . Silentu! — Mi scias. La morto fine venis, sed dum la lasta momento li havis vizion. Li vidis maljunan, karan vizaĝon, kliniĝantan al li, k li aŭdis maljunulinan dolĉan voĉon, kiu sonas kiel kareso: "Mia knabo!"

La kapo, tiu turmentita kapo flanken falis. Liaj okuloj rompiĝis. Sed lia buŝo montris rideton. Kaj tiam? . . . Kaj tiam?

Tiam en tago, kiam la ĉielo ploris k la nuboj malaltaj k malĝojaj pendis super la senbrua strato, kie ŝi loĝas,

tiam la patrino ricevis leteron: "Ĉu de li? Dio, ne, de lia amiko!" En ĝi oni povis legi, per malfacile elektitaj vortoj, ke ŝia knabo mortis kiel heroo . . . Kiel? Kie? Tion ŝi ne legis. Kaj tion ŝi neniam povis ekscii, ĉar ankaŭ la kamarado neniam revidis sian hejmon.

La salono estas sufoke varma. Seriozaj, rigidaj vizaĝoj rigardas al la tuko. La patrino sidas rekte. Ŝia pala vizaĝo estas akre konturita en la ruĝa lumo de la filma militfajro. Ŝiaj manoj kuŝas senmove sur la apogiloj, k kelkfoje mi vidas ŝin fari per ŝia naztuko mallertajn gestojn. Mi nun scias: ŝi ploras. La filino metis sian brakon en tiun de sia patrino: "Ne plori, patrino, "ŝi flustras denove. "Ne plori." Sed ŝia propra voĉo sonas tiel strange, plena je larmoj.

Ĉe la fino, kiam la ĉefheroo el la libro de Remark riskas iom tro sin klini ekster la tranĉeon por kapti papilion k kiam ĉe la malamika fronto soldato direktas sian pafilon kontraŭ li, la patrino eksaltas subite k faras per siaj manoj defendan geston. "Ne! Ne!" Kvazaŭ ŝi volus malebligi tion. La homoj rigardas... La virino kun la blankaj haroj k la dipatrina vizaĝo sidiĝas konfuzite. Kaj tiam la lumo ekheligas la salonon k la homoj formiĝas al la elirejo.

Mi atendas. La du virinoj antaŭ mi same. Kiu nun el ili komencos ekparoli k kion ŝi diros? Restas silento.

Sed kiam la filino helpas al la patrino surmeti mantelon, tiam ĉi lasta diras: "Se mi nur scius, kiel li mortis!" La knabino nur mordas siajn lipojn k ne respondas. Senbrue ambaŭ paŝetas al la elirejo. Kiel unu el la lastaj mi sekvas. Mi frostotremas, kvazaŭ mi sentus malvarmon... k kiam mi preteriras la reklamafiŝon por tiu filmo, kun la serioza melankoli-plena soldata kapo, lumigita per la ruĝa lumo de la militfajro, tiam mi ŝovas alten la kolumon de mia mantelo.

Iras multaj homoj tra la stratoj, sed ili estas eksterordinare seriozaj. La virinon, kun la blankaj haroj, kiu ne sciis, kiel ŝia filo mortis, mi ne plu vidas. Kaj nun mi scias duoble bone: la soldatoj suferis k batalis dum la milito, sed la patrinoj k la edzinoj pagas ĝin per siaj larmoj. Mi pensis



Ni devas savi lin.

pri mia fileto... Li nun estas kvarjara k tiel aminda... same tiel aminda kiel via fileto, patrino...

Se iam post dudek jaroj okazus nova milito? Eble... mi ricevos iun tagon ankaŭ leteron, diranta, ke mia filo mortis kiel heroo. Sed mia koro demandas, ĉiam demandos: Kaj tiam?

Kortuŝite mi metas miajn manojn kontraŭ la vizaĝo k havas penon ne ekkrii: "Patrinoj, ni ĉiutage penu por la mondpaco! La milito estas la plej granda abomenaĵo." *A. E. (15 700).*

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

Studentaj konfliktoj en Japanio

Lastjare la strikintaj studentoj de l' altgradaj lernejoj k de l' universitatoj starigis jenajn postulojn: 30% da rabato de lerneja pago; rajto por memdecidi en ĉiuj studentaj aferoj; libero de parolo, kunsido, sociscienca esplorado k organizado; plikompletigo de lernejaj ekipoj; likvido de sport-grupoj troviĝantaj sub la monopolo de malmultaj; kontraŭstaro al polica interveno en lernej-aferoj; kontraŭstaro al aresto k forpelo de progresemaj studentoj. En la ŝtataj lernejoj la subpremado al la studenta agado estas kompreneble severa. Ekzemple, kiam ĉe la tria (ŝtata) kolegio en Kioto strikis 434 studentoj por memdecidrajto de la lernej-pensionanoj (en julio 1930), 41 studentoj el la partoprenintoj estis forpelataj el la lernejo, tute aŭ dumtempe, k ĉiuj ceteraj ricevis severajn riproĉojn.

En la privat-lernejoj la subpremo ne estas pli milda. En la Ŭaseda-universitato, okaze de maldekstrula striko, la estraro proponis, ke oni havigu al la profesoroj polican rajton en la universitatoj kontraŭ ruĝa agado k ideologio de l' studentoj. La aliaj universitatoj ne aprobis la proponon, sed konsentis unuanime, ke la estraroj restu en intima rilato kun la ŝtata polico. Dum la du unuaj monatoj de ĉi tiu jaro okazis en pli ol 7 el la privataj universitatoj k ŝtataj kolegioj studentaj konfliktoj, plejparte karakterizitaj per proleta tendenco.

La karaktero de l' naci-lernejo en Japanio

La Imperia Societo de l' Instruistoj (privata organizo), unu el la plej influhavaj centroj reakciaj en la instruista sfero japania, proponis fine de l' lasta jaro fondi naci-lernejon kiel unuiĝon de profesi-kvalifikiga lernejo k junular-disciplinejo, kiuj ambaŭ estas nedevigaj, funkcias nokte k uzas la klasojn de l' elementaj lernejoj. La profesi-kvalifikigaj lernejoj estas direktataj de l' Edukada ministerio, la junular-disciplinejo de l' Milita ministerio, kiu lernigas al la junuloj militistajn idearon k teknikon ĝis ilia rekruta aĝo. La lernejoj de l' unua speco enregistris en 1929 181 907 lernantojn (17 796 instruistojn), la lastaj havis (en 1928) 843 702 partoprenantojn (88 640 gvidantojn).

La allogilo al la junular-disciplinejoj estas la kondiĉo, ke oni forprenas 6 monatojn el la kazerna periodo al tiuj, kiuj ĉeestis la disciplinejon 400 horojn dum la daŭro de 4 jaroj. Tamen la ĉeestantara pocento ne kontentigas la estrarojn. La propono unuigi tiujn du specojn de organizoj estas tial tre alloga por ambaŭ ministerioj en la nunaj cirkonstancoj. Oni ne scias ankoraŭ, ĉu la propono, kiu signifas grandan elpaŝon por reakcia edukado, estos akceptata aŭ ne. Ĉiuokaze la fakto, ke oni faras tian proponon, antaŭsignas okulfrape la vojon prenotan de l' reganta klaso por militismigi la tutan edukadan reton.

Laŭ Proleta Pedag. Revuo, Tokio, n-o 5.

Terura faŝista krimo (Italio)

La faŝistoj plenumis en Busnago, malgranda kampara distrikto proksime de Milano, teruran krimon karakterizatan per malkuraĝaĉo k kruelego. Ekzistas tie en iama tempo tre prosperinta konsumkooperativo, kiun ekkaptis la faŝistoj. Sed en la administra konsilantaro restis ankoraŭ du laboristoj apartenantaj al la malnova socialista administracio. Ĉi tiuj provis kontraŭstari al la malŝparego de l' mono de la kooperativanoj fare de la faŝistaj gvidantoj. Ĉe la lastaj konsilantar-elektoj la faŝistoj ĉiurimede provis malhelpi la elekton de tiuj du laboristoj prezentante nur faŝistan liston. Sed ĉiuj membroj de la kooperativo voĉdonis tiam per blankaj voĉdoniloj. Bandoj da nigraĉemizuloj nun alvenis el du najbaraj regionoj en Busnagon, trakuris minackriante la stratojn, frapis ĉiujn loĝantojn, kiuj ne povis ĝustatempe rifuĝi k finfine elserĉis la du konsilantaranojn Ripamonti k Veneziano. Ambaŭ eltrovitaj

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO" ★

en siaj loĝejoj, estas fimortigitaj per ponardoj sub la okuloj de l' familianoj. Evidente la krimo estas organizita k plenumita kun scio k helpo de la estraroj. *Laŭ "Italia".*

Laborista Filmsocieto en Britio

Esperiga flanko de la laborista kultur-movado montriĝas en nia speciala "Laborista Filmsocieto" (Workers Film Society). Ĉi tiu societo prezentas unufoje monate bonajn eksterlandajn filmojn, k la teatro, kiun ĝi luas por tiu celo, estas dufoje en la vespero plenplena. Ni vidis tie germanajn k sovetiajn filmojn laborist-tendencajn, kiujn la filmcenzuro certe ne akceptus por montrado al la ĝenerala publiko. *(3398)*

Fremda mizero — ridinda afero

Lastan jaron en monato majo la franca P. T. T.-istaro (mezaj k malsuperaj oficistoj), eksciis, ke la tiama faŝismema registaro rifuzis plenumi sian promeson niveli laŭ la monvaluto la salajrojn, kiel jam farite por la superaj oficistoj. Tiu ekscio eknaskis ĝeneralan indignon. Okazis protestkunvenoj k fine duhora striketo. La rebato de la registaro estis tuja. Preskaŭ 100 geoficistoj estis eksigitaj k gravaj minacoj pendis super multaj aliaj. Tamen la energia agado de la P. T. T.-istaro ne estis vana; oni parte kontentigis ilin.

En mia ejo unuanime la deĵorantoj obeis la strikordonon. Dum du horoj ni rifuzis labori. Tiam la tuta gazetaro, krom la laborista, unuvoĉe atakis k insultis la strikintojn. Tiom pli bone, mi pensis, tio ja estas bona propagando por la solaj gazetoj, kiuj nin defendas. Tion miaj kolegoj ne povos forgesi, k certe de nun tiuj ĉi gazetoj estos ilia preferata ĉiutaga legaĵo. Sed, ho ve! Granda estis poste mia ekmiro, kiam mi konstatis, ke apenaŭ ses aŭ sep el miaj kolegoj (el proksimume 60) regule legas la gazetojn, kiuj defendis nin. Aliaj eble jam forgesis, ke lastjare ili estis klasbatalantoj. Nun ili ja ricevas sufiĉe bonan salajron, k kiel ŝtatoficistoj ili ne timas senlaborecon. Cetere iu diris al mi, ke *senlaboreco* estas nur *agiteca* vorto de politikuloj, k ke fakte la senlaboruloj estas nur *mallaboremuloj*, ĉar intence ili ne volas trovi laboron (!). Stranga spiritostato! Kaj malfeliĉe tiaj blindaj stultuloj estas multaj en la laboristaj vicoj. Nur egoismo regas en ilia menso. Sed bedaŭrinde, la krizo ne estas finita, k ties konsekvencojn ja povus ankaŭ suferi la nunaj egoistoj. Tio ĉi ja estus dezirinda, por ke tiel ili lernu iom da solidaro al siaj samklasanoj. *A. (5479).*

VARBKONKURSO al "S-ulo"

Unuaj rezultoj

¼-jarajn abonojn varbis: K-do Lisauskas, Carfin (Skotl.) — 5, K-do Ackermann H., Merkstein — 3, K-do Ruus, Tallinn — 2, K-do Hölzgen, Köln — 1, K-do Martin Ch., Chênée (Belg.) — 1, K-do Pelcman, Plzen, varbis tutjaran membroabonanton.

Pri la aktiveco de l' religiuloj en Sovetio

Ĉi tiu artikolo prezentas la respondon de sovetiano al enketa demando farita de okcident-eŭropaj SAT-anoj. La konstatoj k nombroj cititaj datiĝas el la jaro 1929. Intertempe, kiel oni scias, eĉ kreskis la ateista propagando k plimultiĝis la likvido de religiaj institucioj en USSR. Tamen la respondo gardas sian valoron. *Red.*

Ĉu estas vero, ke en Sovetio kreskas la nombro el kreduloj? — Tute ne! Vane kelkiuj parolas pri la "kreskado de religiaj s e k t o j kaj o r g a n i z o j". La lastan fakton mi ne deziras nei; sed oni devas rememori, ke la plimultiĝo de religiaj organizoj komenciĝis post la revolucio, t. e. ĝ u s t e t i a m, kiam la nombro el kreduloj komencis k a t a s t r o f e f a l i. La sama procezo daŭras nun: ni rigardu la ateistan gazetaron, kaj ni vidos en ĉiu numero deklarojn de ekskreduloj ateistiĝintaj. Ofte tiajn deklarojn faras eĉ pastroj. Preskaŭ ĉiutage tie aŭ alie estas fermataj temploj, moskeoj, sinagogoj, kaj tiuj faktoj estas tre gravaj, ĉar laŭ sovetiaj leĝoj preĝejoj povas esti konfiskataj n u r l a ŭ d e z i r o j d e l' l o ĝ a n t a r o p r o t o k o l i t a j.

La nombro de l' registritaj ateistoj konstante kreskas. Certe ekzistas aktiva kristana junul-organizo en Sovetio kaj ankaŭ okazis faktoj, kiel tia ke en iu lernejo la portreto de Lenin estis forŝirata de la muro. Sed kion signifas tio, se samtempe laŭ postuloj de l' loĝantaro estis konfiskataj kelkaj temploj por kluboj kaj lernejoj?

Mi ne okupis min tre detale pri la evoluo de l' eklezio en Sovetio, tamen mi povas prezenti kelkajn interesajn ciferojn pri la forto de l' ekleziaj organizoj en Sovetio. La plej populara eldon-

LA PASTRA LECIONO

V. Ekström (12 439)

(Fino. Vd. antaŭan n-on.)

Denove ni troviĝas en ĉiutaga laboro; fabrikoj nin englutis. Somertagoj ĉe l' dania marbordo restis belmemoro nur k krakantaj maŝinoj estas nun niaj plej proksimaj mastroj. En vespero, fininte nian laboron, ni kelkfoje renkontiĝas en la ĉambroj de la pastra junular-asocio. Tie ni muzikas, ŝakludas, sed — inter ni enŝteliĝas nekontento pri la asoci-sistemo. Laŭŝajne tio estis signo de ĉe kelkaj el ni vekiĝanta racio. Kelkaj opozicias al la ĝisnuna potenco de l' pastro, ĉar ili rimarkis, ke ĉiuj aferoj solviĝis nur liadezire.

Venis la tago, kiam la pastro komprenis, ke ne ĉiuj el liaj adeptoj estas obeemaj ŝafidoj, k li timis, ke ĉe lia sino estas kelkaj lupoj. Por solvi la aferon estis decidite aranĝi diskutvesperon, en kiu la ĉeftemo estu: "Kia devas esti bona kamaradeco". En tiu kunveno partoprenis tri pastroj k unu diakono; krome ni estis proksimume kvardek junuloj.

Mi ankaŭ devas mencii, ke ni opoziciuloj antaŭpreparis nian atakon k miaj plej intimaj amikoj petis min esti parolatakanto kontraŭ la pastroj. Al tio mi konsentis kondiĉe, ke ili min subtenu, ĉar mi havis ian antaŭsenton, ke ili tro respektas la pastron.

Do la ĉefpastro enkondukis per duonhora parolado la diskutadon. Poste mi parolpetis k kritikis la tutan asocion dirante, ke ne estas ĝusta loko por junlaboristo esti ĉe pastroj, ĉar ili ne volas, ke ni libere pensu; krome ne estas kamaradaj ĉiuj membroj, ĉar mi rimarkis la diferencon inter ni filoj de laboristoj k tiuj en la movado partoprenantaj kelkaj filoj de etburĝoj.

Mi ricevis fortan respondon de l' sur la prezidanta loko sidanta pastro, sed mi denove ilin atakis pli k pli akre. Subite unu el miaj kamaradoj stariĝis por min helpi, sed tuj la pastro admonis lin forlasi la kunvenejon, k tion li faris pro timo al sia religiema patrino, ĉar se li ne estus obeinta la pastron, ĉi tiu al la patrino denuncus mian kamaradon.

Ree mi ekparolis dirante, ke min ili ne povas silentigi per simila minaco, tial ke mia patrino ne, kiel la patrino de mia foririnta kamarado, anas al la pastra kunvenrondo. Pro tiu mia diro ekkoleris la pastro k diris: "Ĉiuj el vi, miaj amikoj, kiuj apogas la dirojn de Ekström, stariĝu por ke mi vin konu." Mi stariĝis tute trankvile k ne sen ia fiero, sed — sur la pastra vizaĝo aperis mokrido k — mi neniam forgesos tiun momenton . . . Min kaptis ia maltrankvilo. Mia sidloko estis sur unu el la plej antaŭaj benkoj, tial mi devis min turni por vidi la kaŭzon de la ĝojo k mokridoj de la pastroj, k mi ekvidis — ke ĉiuj miaj kamaradoj sidis! Mi estis tute venkita k humiligita, k kolere mi forlasis la kunvenon kun firma decido neniam plu havi ion komunan kun pastro.

Tio okazis kelkajn tagojn antaŭ kristnasko, k mi kredis la aferon solvita; sed la tagon antaŭ kristnasko mi

aĵo eklezia "Ortodoksa Kalendaro", disvastigita antaŭ la revolucio en centmiloj da ekzempleroj, nun estas eldonata en 20 mil ekz. "Vestnik svjaŝĉennogo sinoda pravoslavniĥ cerkvej v SSSR" (Organo de unu el la plej gravaj sovetiaj eklezioj) aperas en kvanto da 3 mil ekzempleroj. Ambaŭ eldonoj estas leĝe permesitaj.

La fakto, ke je dispono de l' ekleziuloj estas 50 mil temploj, tute ne pruvas, ke la religieco de l' loĝantaro pliintensiĝis. Mi jam diris, ke la nombro da temploj ĉiutage malkreskas, kaj simpla aritmetika kalkulo rezultigas, ke fermante ĉiujare eĉ mil templojn, oni bezonas por la plena neniigo 50 jarojn. Sekve estus mirinde, se post 12 jaroj de proleta revolucio ne restus en Sovetio ankoraŭ tiom da preĝejoj.

Por esti tute objektiva, mi konstatu, ke kelkaj sektoj kreskas laŭ nombro da adeptoj. Sed la adeptaro estas varbata el aliaj sektoj, t. e. el inter aliaj kreduloj, kaj tial la fakto neniel helpas al la ĝenerala kresko de l' kredularo. Vere la kontraŭreligia propagando de la junkomunistaj organizoj kaj de la sovetaj liberpensuloj, t. n. "sendiuloj", multe ŝanĝiĝis rilate al la metodoj aplikataj. La rimedoj uzitaj antaŭ kelkaj jaroj montriĝis netaŭgaj, ĉar ili naŭzis la kredulojn kaj tial havis malan efikon. La ateistoj serĉis sekve aliajn rimedojn por sia influado kaj varbado al la ateismo. La fakto, ke la sovetia gazetaro pliintensigas la ateistan propagandon, pruvas, ke oni serioze volas elradikigi la religian malbonon. Certe ankaŭ la kreduloj pliaktiviĝis, sed tia ilia aktiviĝo ne signifas, ke ilia stato nuntempa estas pli favora. Se komencas furiozi izolita frenezulo, oni metas sur lin "kvietigan bluzon". Sed lia soleca "aktiviĝo" tute ne signifas, ke li dispartiĝis je kelkaj frenezuloj; la fakto de tia aktiviĝo ofte vidigas plimalboniĝon de lia mensostato. Analogian staton vidigas la aktiviĝo de l' kredul-gvidantoj. Kaj same analogie la sovetiaj sendiuloj pliaktivigas sian flegadon!...

N. S. Pargaĉevskij, Naĥtaĥe.

SCIENCO K TEKNIKO

Senmikrobigo de l' akvoj per metaloj

Laŭ konstato de du scienculoj francaj iu ajn akvo, kiu tamen entenas malpli ol 0 gr. 20 da marsalo, seniĝas de siaj malsanigaj ĝermoj, se ĝi iras dum kelkaj minutoj tra sablo metalumita per arĝento. Por sekurigi, sufiĉas ĝin restigi kelkan tempon en rezervujo, filtri ĝin rapide tra ordinara sablo, por ke ĝi eliru elpurigita, sen gusto nek odoro, k senigita de l' mikrob-mortigaj substancoj, kiujn ĝi entenis forlasante la arĝentumitan sablon.

Tio pruvas nekontesteble la potencan agon mikrob-mortigan de l' metaloj, kio depost kelka tempo estas objekto de seriozaj esploroj.

La akumulatoroj nesulfatigeblaj

La akumulatoroj, kiuj estas la sola rimedo por amasigi provizon da elektro, prezentas du gravajn mankojn: 1. ili estas pezaj k malhelpaj; 2. ili sulfatiĝas facile k postulas daŭrajn prizorgojn. Nun la franca Akademio de Sciencoj sciiĝis pri procedo permesanta realigi akumulatorojn nesulfatigeblajn. La originala ideo konsistas en tio ŝirmi la negativan platon kontraŭ la oksidiĝo per hidrogena kloŝo.

Se oni sukcesus nun malpliigi atentinde la pezon de l' akumulatoroj, oni vidus la elektran aŭtomobilon baldaŭ fari neeltenebla la vivon al la esencon konsumantaj aŭtomobiloj.

La dinamiko de l' variemaj masoj

Unu el la problemoj, kiuj plej multe okupadis la fizikistojn k astronomojn, estas tiu pri la varmo elradiata de l' steloj k de la suno. Tiel la suno, kiu, laŭ diversflankaj konstatoj, ekzistus depost almenaŭ du miliardoj da jaroj, elradiadas senĉese konsiderindan varmon, kiu dum tiu tempo povus esti liverita de neniu energifonto konata. La fizikisto Ajnŝtajn (Einstein) donis al tiu ĉi problemo solvon, kiu ŝajnis kontentiga k laŭ kiu, ĉar la maso estus nur formo de l' energio, la maso de l' steloj detruiĝas dum la irado de l' jarcentoj, transformiĝante en radiantan energion laŭ ankoraŭ nekonata meĥanismo.

Nun konstatas astronomo ĉe la Pariza observejo, s-o Mineŭr (Mineur), laŭ tre ekzaktaj kalkuloj, ke oni per tiu hipotezo venas konklude al variemo de l' stelmasoj multe pli granda ol tiu, kiu estas ĝis nun konstatita. Tio determinos la novajn esplorojn, k sendube estigos novajn hipotezojn k novajn malkovrojn.

La legendo pri la biblia superakvego

La rakonto pri la biblia superakvego estas bazita laŭ la plej novaj esploroj nur sur ordinara superakvo. Tiel ekz. lastatempe estas malkovritaj kronikoj kun hieroglifa skribo, en kiuj estas skribite, ke iam la grandaj riveroj Tigro k Eŭfrato kaŭzis tre grandan superakvon. Surbaze de la trovitaj antikvaj sciigoj (hieroglifoj) la angla arkeologo Haroldo Pajv (Pive) eldonis libron tiuteman. Laŭ tiu sciencisto la biblia superakvego okazis antaŭ 6 130 jaroj. Sed de l' jaro 4200 ĝis 3500 antaŭ Kristo fariĝis pliaj 3 similaj superakvegoj. La grandaj riveroj Tigro k Eŭfrato invadis k superverŝis la tutan ebenajon, tiel ke estiĝis kvazaŭ granda lago kelkajn metrojn profunda. La domoj tiam estis malaltaj k la superakvego dumnokte okazanta trovis ĉiujn en la litoj.

Ree laŭ la antikvaj skriboj trovitaj ĉe la esploroj, la estro el unu vilaĝo Bivutros Napistin Noa, preparis dum la lasta superakvego ŝipeton k rifuĝis tien por sin savi kun sia familio k siaj hejmbestoj. De tio devenas la fabelo pri la arkeo (ŝipo de Noa), en kiu li "konservis" el "ĉiuj" bestspecoj unu paron. Ĉar la interrivera lando

---

ricevis leteron de la pastro. Per tiu li invitis min veni al li la venontan tagon. La tono de la letero estis postula, ke mi nepre venu k se mi ne venus, tio estus konsiderata kiel malkuraĝa ago.

Je difinita horo li min bonvenigis per la vortoj miraj: "Vi vere venas!" Komenciĝis nia interparolo k interalie li diris: "Mi ne ĉagreniĝas pro viaj paroloj, sed pro via aroganta mieno." Al tio estis mia respondo, ke li kvankam pastro, tamen ne devus ataki min pro de la naturo donita malbela k nesimpatia vizaĝo, ĉar estas ja lia dio, kiu donis ĝin al mi k tial li devus ataki la ĝustan personon.

Nun li tamen perdis sian paciencon k diris, ke mi elektu inter du aferoj. Aŭ mi devus eksiĝi el la asocio de kristanaj junuloj aŭ mi povus resti membro, sed dum tuta jaro mi ne rajtus min esprimi en kunvenoj k ne rajtus partopreni iajn decidojn de la asocio. "Vi ja povas pripensi la respondon k ĝin doni al mi post kelkaj semajnoj", li patre aldonis.

"Dankon, sinjoro pastro", mi respondis facile, "mi ne bezonas pripensi mian respondon, ĉar vi bone instruis al mi, ke via eklezio ne deziras homojn, kiuj pensas k agas ekster via dikto, tial vi havu viajn fidelajn ŝafojn, k dankon al vi, ke vi igis min kompreni la blufon."

Tiel la protestanta diservisto donis al mi lecionon, k mi lernis malŝati la nigrajn pastraĉojn k ilian instruon LA SUPERSTIĈO.

Proletaria Kantaro

La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia internacia valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj zorge presitaj, faras el tiu volumo unikan verkon, kiaspeca ne ekzistas ĝis nun en iu nacia lingvo.

Prezo: 2,50 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Mezopotamio aspektas kiel granda valo, ĝi estas tre oportuna por superakvegoj. Tion pruvas ankaŭ la samloke okazinta superakvego de l' jaro 1929. Konklude: neniam estis universa superakvego. Tion sciante, oni refutas unu el la multaj argumentoj de la kristana religio, per kiu estis trompataj depost tiom longa tempo la naivuloj. *Esp-igis 16 988.*

MI VOLAS SCII...

Mia Respondo

al K-do J. Bout k al ĉiuj, kiuj legis la artikolon aperintan en "S-ulo" n-o 331 pri la nuna socipolitika stato en Hispanio:

Kiam mi legis la diritan raporton subskribitan de "Madridano", mi indignis k promesis al mi fari ian klarigon pri la afero. Tamen nur la demando de K-do Bout en "Mi volas scii" (n-o 337) plenumigis mian planon. Mi diras, ke "La Sindikatisto", el kiu citas K-do Bout, estas multe pli prava ol "Madridano". La skribaĵo de ĉi lasta ŝajnas kopiita laŭ la oficialaj skribaĵoj de la hispanaj komunistoj, partiecaj k eraraj. Kvankam mi ne estas ano de la C.N.T. (Nacia konfederacio de Laboro) k neniam estis partiano, mi konstatas jenon:

Vere estas, ke la registaro Berenger observis la rapidan kreskadon de l' revolucia sindikatista movado k klopodis ĝin haltigi, sed ne povis; ke la ĉefministro malpermesis leĝan vivon de l' C.N.T.; ke la ĵurnalo "Laborista Solidaro" (Solidaridad Obrera) estas unu el la plej legataj (eldonkvanto: 30—40 000). Ankaŭ estas vere, ke en Madrido anarkistoj k sindikatistoj akiras pli k pli da influo inter la laboristoj. Nevere estas, ke ĉi tiuj laboras nerekte en sindikatoj; malverege estas, ke anarkistoj k sindikatistoj "etburĝiĝas pro timo perdi sian salajratan postenon..." Mi ne povas nei, ke komunistoj estas kruele persekutataj, sed ĉu ne anarkistoj k sindikatistoj same? Al tiuj, kiuj dubas pri tio, mi proponas demandi ĉe ĉiuj malliberejoj en Hispanio, ĉu oni tie ne renkontas anarkistojn k sindikatistojn.

Dum ĉiuj partioj ricevis konsenton de la registaro fari la necesan propagandon por la venontaj balotoj, la C.N.T. estas denuncata k malpermesita. Depost decembro la estraroj eksterleĝigis la C.N.T. Nun, kiam Hispanio ĝuas sian konstitucion, kiu al ĉiuj partioj k sindikatoj permesas la normalan vivon, la C.N.T. restas malpermesita, k la ĵurnalo "Laborista Solidaro" estas ĉiutage denuncata. La komitatanoj de l' C.N.T. vizitis la ĉefministron por peti remalfermon de l' sindikatoj, foje k foje, sed neniam al promesoj sekvis praktika rezulto. Indignitaj pro nerealigo de l' faritaj promesoj, en pasintaj tagoj la laboristoj grupe iris al la sindikatejoj k malfermis ilin perforte. Pro tio kelkaj K-doj estis enkarcerigataj. *Mario.*

Necesas objektiveco

Al la noto aperinta sub supra titolo en n-o 338 de "S-ulo" ni ricevis longan, en tre akra tono verkitan respondon de K-do Eŭsebio Garoz, la aŭtoro de l' prikritikita artikolo. Ĉi tiu respondo parte ne rilatas al la punktoj de l' artikolo, sed kritikas la personon de K-do F. Martin. Ni resumas el tiu skribaĵo sekve nur jenajn demandojn direktitajn de K-do G. al la kritikinto: "Ĉu ne estas vero, ke oni malleĝigis la kom. partion en Hispanio k kruele persekutis ĝiajn anojn? ke oni malleĝigis la C.N.T. (Nacian Konfederacion de Laboro) k nur socialistoj rajtis plue ekzisti, ĉar ili kunlaboris k kunlaboras kun la diktatoreco? ke faŝista ministro Quinos kreis la 'Komités paritarios' laŭ itala modelo por malebligi lab. strikojn, k socialistoj konsilis akcepti tiun institucion? ke kontraŭe agis komunistoj k anarkistoj? k ĉu ne vere la popolo (mi ne diras: proletaro!) vekiĝis dum la 7 lastaj jaroj?"

Jen la diferenco inter "bolŝevismo" k "faŝismo"!

(Laŭ "Plena Vortaro de Esperanto")

"Bolŝevismo = 1. Sistemo pri organizado de revolucia internacia movado politika, kies ĉefaj karakterizoj estas: marksimo kiel doktrina bazo; celado al starigo de proletara diktatoreco; la partioj aŭ naciaj sekcioj estas konsiderataj kiel armeoj komandataj de internacia stabo; la partianoj obeas severan, soldatecan disciplinon. Tiu politika tendenco naskiĝis en la rusa socialdemokrata partio, ĉefe sub la influo de Lenin, k konkeris la ŝtatan potencon en Sovetio dum la jaro 1917. La termino originas de rusa vorto laŭ ĝia senco de plimulto. 2. En Sovetio, sinonimo de komunismo."

"Faŝismo = 1. Itala politika movado celanta la organizadon de la ŝtato sub severa disciplino laŭ korporacia grupigo de la produktistoj por plipotencigo de la nacio. 2. (Mh) Itala politika sistemo iniciatita de Mussolini por per diktatoreco disbati k detrui la socialistan k komunistan tendencojn, kiuj danĝerigis la kapitalistan reĝimon en la lando post la fino de l' mondmilito: la ideologio de l' faŝismo baziĝas sur la kulto al la nacio k malŝato al ĉio demokrata."

Mi reproduktis tiujn ĉi du klarigojn el la Pl.V. por montri al tiuj, kiuj ĝin ne posedas, ke fakte la foresto de la vorto *Soveto* el la Pl.V. *ne estis intenca,* kiel oni pretendas, *sed forgesa.* Mi opinias, ke se oni intence forstrekus la vorton *Soveto* por fuŝi la rusajn terminojn, la aŭtoroj havus pli da avantaĝo forstrekinte la vortojn "bolŝevismo" k "komunismo" (kiu lasta ankaŭ enestas la Pl.V.). En *ambaŭ* klarigoj la aŭtoro bone montras, ke li tute ne havis intereson fuŝi la rusajn terminojn, ĉar eĉ sub la vorto *bolŝevisto* oni trovas la vorton *menŝevisto.* *Soares.*

SOCIALISMO K MODO

Ĉiu reganta klaso formas siajn vivmanierojn; ili estas la reflekto de la koncerna klaso. Precipe la vestaĵo estas tia reflekto aŭ valor-esprimo por la kultura stato. La tasko de l' modo estas adapti la vestaĵon al la evoluo de l' homoj, ilia tekniko, vivmanieroj ktp. Sed neniam la modo povas plenumi sian taskon, se ĝi estas diktata de kelkaj reĝoj de la modo pro negoca intereso k por kontentigi la vestmanion de kelkaj mil geriĉuloj. Al tiu burĝa modo mankas la esenco de l' reala modo, ĉar ĝi ne kreas novon por kontentigi la kreskantajn bezonojn de l' homaro. Tial la burĝa modo estas nur organizo konforma al la burĝaj kutimoj. Ni neniam devus imiti vestaĵon k vivmanierojn de klaso, kontraŭ kiu ni batalas.

Ankaŭ la laboristaro estas ankoraŭ tro malmoderna laŭ sia vivmaniero. Batalante nur ekonomie por la socialismo, ni tute forgesas, ke ankaŭ en la familio, en la vestaĵo k alie oni povus esti pli socialismema. La modo kunpaŝas kun la progreso de l' homaro; tia estas ĝia senco. Homoj kun diferencaj vivmanieroj ankaŭ bezonas diferencajn vestaĵojn. Sed jam pro tiu kaŭzo ni ne devus imiti la burĝan modon, ĉar mankas al ni la mono por vivi same k por aĉeti same luksan veston. Laboristoj, kiuj ne vivas laŭ burĝaj kutimoj, ne vizitas dancejojn k aliajn banalajn prezentojn, sed migras k partoprenas en socialista kulturlaboro dum sia libertempo, tiuj ja tute ne povas vesti sin per lakŝuoj k frako.

Mi kredas, ke ni plej sukcese batalas kontraŭ la burĝa modo disvastigante niajn socialistajn ideojn inter la laboristaro. Socialisto ne nur batalas por pli bonaj salajroj k pli bona ekonomia situacio, sed ankaŭ kontraŭ la tuta burĝa ideologio k kun tio kontraŭ la burĝa modo. *15 299, Meissen.*

Per tiu ĉi artikolo ni fermas la diskuton pri ĉi tiu temo. — Red.

TRA ESPERANTIO

EL LA ADMINISTREJO

Ni donas ĉi kune bildon pri la evoluo de la abonantoj al "S-ulo" k "LNE". Ni citis ĉiun landon aparte, por ke la K-doj en la koncernaj landoj pli klare vidu, kiel evoluis nia SAT-afero. Sendube, en kelkaj landoj la senlaboreco multe malhelpis nian progreson, sed ankaŭ la laboro de la skismigantoj reĵetis nin en staton de antaŭ 2—3 jaroj. Ĉefe la stato en Sovetio estas nun tre ĉagrena; tamen tio ne estas kulpo de niaj tieaj Gek-doj, sed nur de la C.K. de S.E.U.

La SAT-anoj estas dissemitaj en la tuta mondo k oni povus opinii, ke en aliaj landoj baldaŭ varbiĝos tiom, kiom necesas por reatingi la staton de junio 1930. Tiudate la abonantaro al "S-ulo" atingis sian rekordciferon: *4000 pagantajn abonantojn.* Estas bedaŭrinde, ke troviĝis homoj, kiuj jam vidis en SAT tro grandan organizon k malfortigis ĝin per partieca fanatiko. Tiun ĉi frenezan, al la Proletaro malutilan agmanieron, ne nur devas senti SAT mem, sed ĉefe ankaŭ niaj Sovetiaj Gek-doj. Pli malfrue ni ankaŭ publikigos tabelon pri la stato de nia membraro en ĉiuj landoj.

En multaj terpartoj, la abonantaro ĉiam restis la sama. En aliaj la abonantaro eĉ malprogresis. Sovetion ni ne kalkulu inter ĉi tiuj, ĉar niaj tieaj K-doj ne mem kulpas pri la regreso. Tre laŭdinde oni laboris en jenaj landoj, kie la abonantaro konsiderinde kreskis: Japanio, Nederlando, Portugalio k Svedio. Estas strange, ke en Svisio nia movado ne volas kreski. En junio 1929 estis tie 29 abonantoj al "S-ulo" k hodiaŭ estas 30.

LANDO	SENNACIULO jun. 1930	dec. 1930	marto 1931	LA NOVA EPOKO jun. 1930	dec. 1930	marto 1931
Afriko	4	2	2	1	1	1
Alĝerio	4	3	7	—	—	—
Argentino	13	17	13	12	13	8
Aŭstralio	3	14	15	1	3	2
Aŭstrio	207	186	186	56	49	44
Belgio	77	67	73	35	29	21
Brazilio	4	4	6	4	1	1
Britio	207	183	173	61	45	35
Bulgario	5	5	5	25	6	3
Ĉeĥoslovakio	160	127	107	36	35	21
Ĉilio	1	1	1	1	1	1
Ĉinio	2	5	6	2	5	6
Dancigo	3	2	10	2	1	5
Danio	6	7	6	1	1	1
Egiptio	1	1	—	—	—	—
Estonio	29	20	15	10	10	4
Finlando	20	12	14	10	4	6
Francio	230	234	218	134	128	113
Germanio	1146	1027	872	178	129	89
Hindio	1	1	2	1	1	1
Hindo-Ĉinio	1	1	—	1	1	—
Hispanio	116	92	98	43	39	21
Hungario	88	84	11	2	4	3
Islando	1	5	4	1	6	6
Italio	1	1	1	—	1	—
Japanio	68	67	91	56	46	69
Javo	—	—	—	—	1	1
Jugoslavio	14	12	7	6	5	1
Kanado	6	7	4	4	4	4
Kubo	1	2	1	—	1	—
Latvio	8	6	8	6	5	6
Litovio	3	2	3	2	2	4
Luksemburgo	1	—	—	—	—	—
Maroko	—	1	—	—	—	—
Meksikio	1	—	—	—	—	—
Nederlando	123	133	161	30	28	25
Norvegio	29	20	26	8	5	4
Oceanio	2	—	1	—	—	—
Persio	2	1	—	1	1	—
Polio	93	69	62	44	31	21
Portugalio	18	16	23	7	6	9
Rumanio	6	4	2	2	2	1
Saarlando	7	7	6	1	1	1
Sovetio	1025	374	96	406	159	28
Svedio	182	173	177	42	30	21
Svisio	33	37	30	11	8	9
Turkio	1	1	3	1	1	2
Urugvajo	1	1	1	1	1	—
Usono	86	71	62	32	26	17
	4040	3105	2609	1277	876	615

Komuniko de la Plenum-Komitato

Kiel sekvo de nia decido, aperinta en la n-o 327, ni publikigas ĉi-sube la nomojn de la eksigitoj, apartenantaj al la unua el la tri kategorioj, kiujn ni difinis. Tiun kategorion konsistigas la respondecaj gvidantoj de la opozicio, kiuj plej evidente k konscie perfortis la statuton k agis kontraŭ la interesoj de la Asocio.

1. Drezen E. (1518), (Moskvo); 2. Besler O. (715), 3. Riĥter F. C. (125) (Leipzig) — komento nenecesa. — 4. Kampfrad V. (2698) (Leipzig), kiel gvidanto de EKRELO; 5. Bata J. (246) (Berlin), kiel komisiita redaktoro de "Internaciisto"; 6. Volf F. (13 058) (Berlin-Ch.), kiel respondeca por la redakcio de "Internaciisto"; 7. Riĥter Georg (5484) (Berlin), kiu subskribis respondece la "Alvokon por la ĝenerala voĉdonado de la SAT-anaro" de la opozicio k estas elektita por kontroli la voĉdonilojn; 8. Muravkin H. (2921) (Berlin); 9. Vildebrand V. (483) Berlin), ambaŭ ĉi lastaj membroj de la "Interliga Oficejo de Klasbatala SAT-opozicio" en Berlin.

TRA LA MOVADO

KRONIKO

BULGARIO. La 18-an de marto policistoj traserĉis la loĝejon de unu el niaj K-doj en provinca urbo, arestis lin k konfiskis ĉiun literaturon kontraŭ la nuna sociordo, inkluzive "Balkana Laboristo". Li restis enfermita ĝis 22. majo k estis forte batita. Lia sola kulpo estis, ke li parolis kelkajn vortojn okaze de enterigo de laboristo. — Lastaŭtune estis fondita bulgara LEA kun sekcioj en pli grandaj urboj k vilaĝoj k oficiala organo "Balk. Laboristo", por forpreni el la kadro de l' "neŭtrala" Bulg. Esp. Asocio la lab. elementojn, kiuj konsistigas la plimulton en ĝi.

GERMANIO. Boĥum. La SAT-rondo aranĝis la 29. marto skrib-konkurson por la kursanoj (kursgvidanto Maares). La plej bonaj tradukoj de germ. teksto estis premiitaj. 7 K-doj ricevis premiojn. La ĉi tiea "Popolgazeto" presas artikolojn germane k esp-e; la plej granda parto el ili aperis ankaŭ en 4 aliaj gazetoj de la Rur-regiono. Aperis: en nov. — 6, dec. — 16, jan. — 12, feb. — 4, marto — 6, komenco de aprilo — 2 artikoloj. (8270.)

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La oficiala filmo eldonita de la dana registaro pri Danio kun esperantaj tekstoj trovis grandan sukceson en Prago antaŭ membroj de l' ĉeĥoslovakaj ministerioj, de l' armeo, gazetaro ktp. Infanĥoro aŭdigis esp. kantojn dum la prezentado.

*

UEA-delegito en Prago intervjuis la konatan sovetian sciencisto prof. Samojloviĉ, kiu gvidis la glacirompan ŝipon "Krasin" k savis la italan polus-ekspedicion en 1928, okaze de lia parolado en tiu urbo lastdecembre. Samojloviĉ esprimis sin tre favore pri esp-o.

*

Supera lerneja konsilisto vizitis kun la distrikta jun-instruistaro esp-an klason en

urbeto apud Dresdeno. Post esp. leciono k peresp-a geografia leciono la konsilisto mem pritraktis kun la infanoj ŝercan historion. La klaso havos en la nova lernjaro 22 gelernantojn.

*

Esperanto multe disvastiĝis dum la unuaj du monatoj de tiu ĉi jaro en germanaj policaj rondoj. Precipe en Berlin, kie instruas pastro Ĉe persone la policanojn, la nombro de l' kursanoj tiom pliiĝis, ke estis necese aranĝi tri paralelkursojn, kiuj okazas en la plej granda salono de l' Berlina polica prezidejo. Fakgazetoj lastatempe subtenas esp-on. — Ĉe la polica direkcio de Prago finiĝis kurso kun 44 partoprenintoj.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Erica Maxwell, ANSTATAŬA EDZINO. Traduko el la angla lingvo de M. Sampson. Eld. Heroldo de Esperanto, Köln, Germ. Formato 13×20; 212 paĝoj. Prezo: broŝ. 3,20 mk. g., bind. 4,80 mk.

Erica Maxwell estas la pseŭdonimo de s-ino *Lilian Pajk (Pyke),* kiu naskiĝis en Viktoria, Aŭstralio, k vivis en Melb'n (Melbourne) ĝis sia morto en 1927. Ŝi estis tre fervora esperantistino k eĉ en ĉi tiu sia verko ŝi reklamas por nia lingvo per oftaj favoraj aludoj. *Anstataŭa edzino,* kiu titoliĝas angle *A wife by Proxy,* estas interesa, tre moderna romano kun eksterordinaraj aventuroj, kiuj okazas sinsekve en Rusujo, en Anglujo, iom ankaŭ en Germanujo k fine en Aŭstralio.

La ĉefa rolulo *Julian Firth* el Aŭstralio edziniĝas en Rusujo ian junan grafinon, *Sophie Karenska,* kondiĉe ke tiu edziĝo estos simpla formalaĵo por ke ŝi povu forkuri al Anglujo por retrovi en Londono sian antaŭan fianĉon, sed ĉi tie nun, hazarde k mirinde, ŝi estas anstataŭata de ia samaĝa rusino, fraŭlino *Cara Stretton,* naskita en Aŭstralio, kiu fizike tiel similas al Sophie, ke Julian mem ne vidas la anstataŭigon. Tiam post multaj dramecaj, nekredeblaj okaziĝoj, Julian reiras al sia patrolando, Aŭstralio, kun Cara, kiun li nun amas k kiun li ĉiam kredas sia edzino. Fine ŝi estas informata pri la morto de Sophie; nun timante plu nenion, ŝi konfesas la veron al Julian k ambaŭ geedziĝas en ĝojo k en feliĉo.

La traduko de s-ino Sampson legiĝas flue k facile. La libro estas senerare presita k entute ĝi sin prezentas tre plaĉe. Mi notis jenajn neologismojn: *obstaklo, sangvina, eskapi, ŝoki, defii, impeto, transversi, persvadi, karito, respondeblo, inkludi.* S-ino Sampson tre ŝatas la sufikson *um;* ŝi diras: brakumi, komfortumi, ombrumi, partumi, okulvitrumi, fingrumi, sin robumi, brilumi k. a.; k ŝi ankaŭ multe tro ŝatas tiun malbenitan prepozicion *je,* kiun Zamenhof en la fino de sia vivo nepre evitis k anstataŭis per alia prepozicio; en la tuta *Proverbaro,* oni ne trovos eĉ unu solan *je.* *H. B.*

Unu bileto. Biblioteko de Japana literaturo. Vol. 6. Rampo Edogaŭa. El la jap. originalo trad. Joŝiŝi Ŝimomura. Esperanto-Kenkju-Ŝa. Form. 12×16 cm; 41 pĝ. Prezo: 0,60 mk. g.

Unu bileto estas interesa rakonto pri detektivo laŭ Ŝerlok Homz (Sherlock-Holmes). Iu sinjorino estis trovata sur la reloj de la fervojo, kun la korpo tratranĉita de la lokomotivo. Komence oni konjektis memmortigon, sed la lerta detektivo Kuroda montris, ke la sinjorino estis antaŭe venenita k tuj oni kulpigis ŝian edzon, la kleran doktoron Tomita. Feliĉe al la doktoro jen iu eltrovis apud la kadavro unu bileton de la fervoja kompanio, kiu pruvis lian senkulpecon: lia malsana edzino estis sin veneninta k memmortiginta pro ĵaluzo k venĝo al sia malfidela edzo.

La tradukinto, s-ro Ŝimomura, posedas tre bone nian lingvon, kiun li spicas tie k tie per kuriozaj esprimoj, ekzemple: *plumnomo* (pseŭdonimo de verkisto); li trovis la *orienton* de sia vivo (la sekvotan direkton), la *konturo* de la testamento (resumo, esenca parto), *lecioni* (instrui), *prepara* juĝisto (enketa), k. a. Bedaŭrinde preseraroj svarmas en la teksto tiel, ke la presisto devis aldoni kromfolion plenan de korektoj. *H. B.*

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L'Effort, Lyon, 28. 3., Infanlab. en Estonio; *Sceländer Volksstimme,* Biel, 27. 3., Kion mi ne komprenas (336).

Represis el "LNE"

Le Populaire, Paris, 6. 4. (el la sportn-o).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

L'Effort, Lyon, 28. 3.; *Menschen,* Gent feb.-marto (rubr.); *The Labour Woman,* Lond., apr. (rubr.); *Signalen,* Stokh., 2. 4.; *Volksblatt,* Boĥum (Volkswacht, Witten, Volksztg., Herne, Wattenscheid, Freie Presse, Wanne), 4., 10., 17., 20., 28., 31. 3.; *Westf. Volksztg.,* Boĥum, 17. 3.; *Motorcikl. gazeto germana,* 1. 3.

Socialista Esp. Grupo

serĉas koresp-adon kun Gek-doj el ĉiuj landoj. Resp. garantiata — Samtempe ni petas tiujn, kiuj havas materialon por ekspozicio, kiu okazos dum la 1-a asocitago de la "Socialista Esp. Asocio" en Frankfurt/M., pentekosto 1931, sendi al ni ĝin. Ankaŭ L, PI el ĉ. landoj ni deziras. Laŭdezire ni resendos tiun materialon. Adr.: K-do Franz Rabl, Pützerstr. 102, *Frankfurt/M. — 21* (Germanio).

Esperantista Orkestro

deziras interrilatiĝi kun similaj esp-istaj muzikrondoj ĉl. — Skribu al K-do SAT-ano: Ricardo Guiles, Box 5, Orquestina esperantista, *Valencia* (Hispanio).

NIA POŜTO

6707. — La ricevita artikolo aperos. Principe ni povas respondi jese pri la de vi projektita artikolo. *Red.*

KORESPONDADO

AŬSTRIO

— Grupo dez. koresp. k interŝ. ekspoziciaĵojn kĉl. Adr.: Johann Hajny, Grundsteingasse 34/6, *Wien, XVI.*

K-do Hans Weinhengst, Jagdgasse 5-a/36, *Wien, X,* koresp. kun inteligentaj, perfektaj esp-istoj ĉl. Unu resp. certa.

GERMANIO

K-do Ernst Hahn, Wiesenstr, 10/I., *Hohenstein-Ernstthal/Sa.,* pri teologiaj, astronomiaj k fotografiaj temoj.

K-do Rudolf Walther, Schulstr. 13, *Leipzig-Thekla,* kĉl, pref. kun Anglio, L, PK, PI. Certe resp.

K-do Ignaz Blaser (ĥemigrafisto), Barbarossa-Platz 3/II., *Köln/Rh.,* serĉas objektivajn Gek-dojn el ĉl. precipe el USSR, pri ĉ. temoj. Mi certe resp.

K-do Walter Täubrich, Nibelungenring 40/I., *Leipzig S 3,* kĉl, L, PK, PI, PM.

HISPANIO

K-do Pedro Tejero, str. D-ro Balari 66, *Sabadell,* pri proleta movado kĉl, L. Nepre resp.

K-do M. Marti, str. Sallarés 43, *Sabadell,* pri politiko, religio kĉl. Resp. garantiata.

— 8 K-doj dez. kolektive koresp-adi kĉl, pri seriozaj temoj. Skribu multnombre! Adr.: Manuel Prat, str. Monserrat 81, *Sabadell.*

K-do Emilio de Pascual (36 j., meĥanikisto), Calle de Ponce de Leon 7, bajo 2, *Madrid,* L, PK, PI, kĉl, ankaŭ kun samprofesianoj.

SOVETIO

Rusa pentristo k instruisto dez. kor. kun samideanoj ĉ. l. pri ĉ. temoj, interŝ. PI, ilustr. ĵurn., popolpentr., gravurojn k PM (rusaj k ukrain.), *Nikolaev,* "Budinok Osviti", K-do P. Ŝĉerbakov.

K-do Miliĉiĉ Ivotov Ivan (komercisto), *Guatimozin,* Argentino, F.C.C.A. estas petata doni vivsignon al K-dino Fanja Moskina, Uĉiliŝĉkaja 8/10, kv. II., *Kremenĉug.*

Stockport-Cheshire (Anglio)

SAT-edziĝo. La grupanoj de Stockport kore k SAT-anece gratulas Ge-SAT-anojn Clara Wilde (14 916) k Emlyn Jones (16 693), kies edziĝon oni solenis paske. La geedzoj akceptis edziĝtoston trilingve (esperante ktp.). *B. F., Peranto.*

Geamikoj de la tuta mondo!

La anoj de la esperantista klubo en Arlóv deziras korespondadi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri malsamspecaj temoj. Respondo estas nepre garantiata. Adr.: S-ro Erik Olsson, Box, 76, Arlóv (Svedio).

ENHAVO

	pago
La naciismo en Palestino	233—34
El Germanio	234
"En la Okcidento nenio nova"	234—35
La klasbatalo tra la mondo	235—36
Pri la aktiveco de l' religiuloj en Sovetio	236—37
La pastra leciono	236—37
Scienco k tekniko	237—38
Mi volas scii...	238
Necesas objektiveco	238
Jen la diferenco inter "bolŝevismo" k "faŝismo"!	238
Socialismo k modo	238
Tra Esperantio	239—40
Korespondado	240

Presejo: Neudrag, Leipzig (Germanio)